


SVISA ESPERO

OFICIALA ORGANO DE
SVISA ESPERANTO-SOCIETO
(S.E.S.)



Klarigo: ★ Esperantistaj centroj en Svislando
Unuopaj Esperantistoj ankaŭ en aliaj lokoj

Jaro 1946 — 42-a Jarkolekto

N-ro 4 Junio-Julio

ELDONAS:

CENTRA KOMITATO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO

BERN

La kunvenejo de la 31-a Universala Kongreso de Esperanto ankoraŭ nun estas unu de la renkontejoj kaj

CENTROJ DE LA ESPERANTISTOJ

Por Svisoj tiu-ĉi bela urbo estas vivanta memorigo pri la gloraj epokoj de nia historio.

Por niaj eksterlandaj amikoj Bern estas monumento de mezepoka beleco, kiu staras preskaŭ senkompare en la detruita Eŭropo.

Esperantistoj! Bern estas la ĝusta loko por reunuiĝi por restarigi nian pacan laboron, ĉar ĉi-tie la devizo estas: libereco, sendependeco kaj respekto de unu por la alia!

LA PLEJ GRAVA AFERO -

en la tuta mondo nun estas ke la mondo unuiĝu por fari daŭran pacon. La plej grava afero en Eŭropo nun estas ke Eŭropo unuiĝu! — ne nur por sanigi la vundojn de la milito, sed por eviti kaj malebligi la militon entute! Daŭra paco estas ebla, sed nur sur fundamento de kompreno, amo, justeco kaj kunlaboro.

Krei tian fundamenton sur ekonomia, sociala kaj lingva kampoj estas la celo de

„EUROPA UNION“,

la svisa movado por la unuiĝo de Eŭropo. Al samideanoj en Svislando ni volonte sendos senpagan literaturon en la lingvoj germana, franca kaj itala. Ni ĝojos se per tiu-ĉi alvoko, kiun ni elsendas en Esperantujon, ni trovos ankaŭ en aliaj landoj homojn kun la sama ideo; kun ĝojo ni respondos iliajn demandojn kaj helpos ilin kontakti similajn movadojn en siaj propraj landoj.

EUROPA UNION

Fürstensteinerstrasse 30

BASEL Svislando

Svisa Espero

Oficiala informilo de Svisa Esperanto-Societo (S.E.S.)
 Societa kaj redakcia adreso: Neuveville (Berne)
 Poŝtĉeka konto: VIII 21395 Zürich

=====

1946/N-ro 4 Junio/Julio Jara abono (8 n-roj) en Svislando Fr.2.50
 en eksterlando Fr. 3.-- aŭ 10 internaciaj respondkuponoj.

=====

Jara kotizo de Svisa Esperanto-Societo (inkl.abonon): Fr. 4.--

=====

Aerpoŝta salutletero.

Iom tro malfrue atingis nin dum la svisa kongreso en St.Gallen la jena letero:

"La Argentina Esperanto-Ligo deziras esprimi al la Kongreso de la Svisa Esperanto-Societo siajn sincerajn bondezirojn, por ke la gesamideanaro kunveninta sub la signo de la verda stelo, alportu grandan helpon al la restarigo kaj fina venko de nia movado. En la nuna momento ĉiu kunveno kaj ĉiu decido estas gravega, kaj ni ne dubas ke via kunveno kaj ĝiaj decidoj estos gvidataj de la spirito de la progreso.

Saluton al ĉiuj kongresanoj, nome de la Argentina Esperanto-Ligo:
 Tibor Sekelj, ĝen. sekretario."

" La horo de Hindujo "

De kelkaj jaroj, SES kutimas malfermi siajn manifestaciojn per seriozaj prelegoj, kiuj alportas al la aŭdantoj grandan spiritan pliriĉiĝon kaj altnivelan ĝuon kaŭzatan de flua kaj eleganta elokventeco, - kio certe pli valoras ol dek lecionoj pri sintasko kaj gramatiko.

La 1-an de Junio, en St.Gallen, ni retrovis tiun mildan atmosferon kreitan de la zamenhofa etiko, dank' al la parolado de P-ro Edmond Privat, pri la Hinda problemo kaj ties sukcesonta solvo. La paca revolucio instigita de Gandhi, persistema, sed nepre ne perforta, kondukas nun kvarcent milionojn da Hinduoj al libereco politika. Efektive, la Brita Registaro delegis komisionon por sincere diskuti kun estroj de la Hinduja Parlamento ("Kongreso") pri la plej taŭga maniero transiri al nova, tute sendependa reĝimo.

La Eŭropaj gazetoj bedaŭrinde apenaŭ atentigis pri la tutmonda signifo de tiu ago gvidata de sincereco kaj reciproka respekto, kiu honoras tiel la Hinduojn kiel la Britojn kaj tre verŝajne grave kaj favore influos la evoluon de niaj politikaj metodoj.

Certe restas klarigendaj multaj malsimplaj demandoj, ekz. la kondiĉoj de la kunvivado de Hinduoj kaj Mahometanoj, la politika statuto de la t. n. Reĝlandoj, la starigado de kontentiga federacia konstitucio, ne forgesante la estontajn rilatojn inter la nova ŝtato kaj la ministraro de la hodiaŭa imperiestro, sed ni rajtas esperi, ke la Hinduoj povos apliki inter si la samajn noblajn regulojn kiujn ili jam uzis rilate Britujon.

La preleganto atentigis nin ankaŭ pri la diferenco inter nia okcidenta kaj la orienta etikoj. Dum ni emas taski la valoron de pensa sistemo aŭ de konduto laŭ ties videblaj fruktoj, - la orientanoj subtenas ideojn, principojn kaj etikon, ne okupigante pri tio, ĉu ili vidos aŭ ne ilian venkon aŭ efektiviĝon. La unua sistemo kondukis nin al la " reala politiko ", dum la dua ĵus ebligis al la Hinduoj liberiĝi sen sanga revolucio.

Majo 1946

Tiuj kiuj hezitis kaj fine rezignis pri la partopreno en la ĉi-jara Verda Ferio vere povas bedaŭri, ĉar tiu semajna restado en la bela urbo St.Gallen estis treege ĝojiga kaj valora. La partoprenintoj ekkonis la plej interesajn vidindaĵojn de la urbo kaj faris ekskursojn en la tipa kaj plaĉa regiono. Belaj horoj travivitaj en samideana rondo.

Sed al tiom da plezuroj estis aldonataj aliaj, pli valoraj por la movado mem, nome la plezurojn partopreni la perfektigan kurson ĉiumatene. Kiu ne ankoraŭ havis la ŝancon sekvi kurson gvidatan de s-ro Andreo Cseh, tiu ne scias, ke duhoraj tiaj lecionoj povas flanke de valora instruado, doni tiajn ĝuojn, ke la kursano ĉiam ĉagreniĝis pri tio, ke la horo de la tagmanĝo tiom rapide alvenis....

Vespere, s-ro Cseh paroladis al ni pri la propagando por Esperanto dum la heroa epoko de siaj komencoj en E.-movado. Miris nin la entuziasmo kaj lerteco de la unuaj propagandistoj, sed nun la tempoj ŝanĝiĝis kaj ni devas trovi la taŭgajn metodojn por la nuno kaj la loko.

Alifoje ni aŭdis interesajn klarigojn pri la "Universala Ligo" fondita dum la plej malĝojaj tagoj de la milita okupado en Nederlando kaj nun vigle kaj utile laboranta ankaŭ sur neesperantista kampo. En SE/1-1946, ni jam informis pri UL, sed ŝajnas, ke ne multoj interesiĝis sufiĉe. Eble kelkaj kredis, ke UL estis ankoraŭ nova organizaĵo celanta konkurenci la jam ekzistantajn; tamen tio tute ne estas la kazo, male. Per eta kaj nura kotizo, vi povas fariĝi membro kaj tiele helpi la laboron de la UL ĉefe sur la neesperantista kampo. Jam eminentuloj estis membroj kaj subtenas la agadon de UL en Nederlando kaj nun iom post iom la UL diskonigatas en aliaj landoj. Interesuloj sin turnu al s-ino L. Riedle, Girhaldeweg 1, Zürich 9, perantino de Universala Ligo por Svislando.

Alian vesperon ni aŭdis sinjoron Cseh rakonti pri la E.-movado kaj ĝenerala malfacila vivado en Nederlando dum la milito. Aŭdinte tion, ni sentis nin humiligataj pro la grava kaj kuraĝa sinteno kaj daŭra laborado por Esperanto en tiom premaj tempoj, dum ni Svisoj atendis pli favorajn tempojn por agi!...

Ankaŭ amikaj babiladoj pri rememoroj el la Verdaj okazaĵoj, espero por la estonteco de nia afero, gajaj kun-estadoj forflugigis tiun semajnon kvazaŭ sonĝo.... belagajn sonĝojn.....

La Verda Ferio finiĝis per bela aranĝo sabaton vespere, 1-an de Junio: Unue interesplena parolado de P-ro Privat, kiun ni resumis ĉi-supre.

Sekvis rakontoj de s-ro Cseh pri la travivaĵoj en Nederlando dum la milito. La nobla sintenado dum la persekutoj, la tragediaj okazaĵoj, la suferoj, la luktado por la vivo, la kunvenoj de la Esperantistoj malgraŭ la malpermeso, ĉiuj temoj, pli interesaj unuj ol la aliaj estis tiel lerte priskribitaj de s-ro Cseh, ke ni kvazaŭ vidis tiujn scenojn en filmo.

Poste la ĉeestantaro estis ĉarmata de la Voĉo de kantistino. El la kantoj en Esperanto ni citas "La Kapelo"-n, komponita de s-ro Ed. Ducommun, Les Brenets kaj la Svisan Kantikon, tradukitan de s-ro W. Hammer, Zürich.

Juna samideano, H.Strasser deklamis "LaVojo"-n kaj amika kunestado kompletigis kaj finis tiun belan aranĝon.

Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo

1946

en Rest. Kaufleuten, St.Gallen

P r o t o k o l o .

Malfermo: 9.25 h.

Prezido: s-ro J.Gilliard.

Ĉeesto : 55 personoj.

Prez. Gilliard salutis la ĉeestantojn ĝenerale kaj speciale nian gaston s-ron Andreo Cseh, kaj nian honoran prezidanton d-ron Edm. Privat. Li konigas la saluton al nia kongreso de s-ro Mendlevice, Bontemplaj esperantistoj en Stockholmo, s-ro Schneider Thun.

S-ro Cseh salutis nome de "Universala Ligo", nederlanda esperantistaro kaj Nederlanda Societo por la apliko de Esperanto, organizaĵo multpromesa al kiu apartenas eminentuloj de la lando.

D-ro Privat salutis la ĉeestantaron nome de la Konsilantaro de la Por-pacaj Organizaĵoj en Genevo.

Salutojn de IEL, de s-ro Goldsmith, de red. de "Heroldo de Esperanto", kaj de s-ro Theo Jung transdonas s-ro O.Walder.

Nome de la trafikoficeja direktoro salutis s-ro H.Kürsteiner.

La anaro kantas la esperantan himnon.

Prezidanto Gilliard prezentas la traktaĵliston, nome:

1. Alvoko de la delegitoj,
2. Protokolo de la lasta ĝenerala kunveno en Montreux,
3. Raporto de la Prezidanto de la C.K.,
4. Raporto de la kasistino kaj de la kaskontrolintoj,
5. Raporto de la Prezidanto de la Ekzamena Komitato,
6. Fikso de la kotizo por 1946,
7. Budĝeto por 1946,
8. Elekto de la SES-prezidanto kaj de la grupaj konsilantoj,
9. Elekto de la loko por la estonta SES-jarkunveno,
10. Diversaĵoj.

Tiu traktaĵlisto estas sendiskute akceptata.

1. La alvoko de la delegitoj montras, ke escepte Bienne kaj Neuchâtel, ĉiuj grupoj estas reprezentataj kun 13 voĉoj
115 izolaj membroj rajtas je 12 voĉoj
do entute 25 voĉoj

2. La protokolo de la lasta ĝenerala kunveno estis publikigita en "Svisa Espero". Propono, ke oni ne legu ĝin estas akceptata.

3. La raporto de la prez. de la C.K. aperis en SE/2-1946. S-ro Gilliard aldonas, ke intertempe li fine sukcesis forsendi la kolektitajn nutraĵojn al Aŭstrujo.

La raporto de la prez. estas sendiskute akceptata kun danko al la farinto.

4. Raporto de la kasistino kaj de la kaskontrolintoj.

F-ino Schaerer mallonge komentarias la ciferojn publikigitajn en "Svisa Espero. F-ino Steinmann legas la raporton de la kaskontrolintoj. La mastrumado de la societo estas sendiskute akceptata kaj nia kasistino dankata pro la bone farita laboro.

La prezidanto donas la ĝojigan informon; ke malavara samideanino deklaris sin preta pagi la plenan deficiton de la jaro 1945, je Fr. 272.- Longa aplaŭdo montras la dankemon de la ĉeestantoj al nia bonfarulino.

5. Raporto de la Prezidanto de la Ekzamena Komitato.

Pro nepreteco de la diplomoj, tiu traktaĵo estas iom prokrastata.

6. Fikso de la kotizo por 1946.

La prezidanto informas, ke pro la grandaj elspezoj (542 leteroj jare, plikariĝo de la materialoj ktp.), oni devus pensi pri kotizaltigo. S-ro Jayet pledas por sama kotizo de fr. 4.- por ke ankaŭ la grupoj havu siajn rimedojn.

Tiu propono estas akceptata, ni enkasigu fr. 4.- po membro.

La prezidanto, nome de la CK, faras la jenan proponon:

Por pliigi la societajn rimedojn de SES, ni kreu 2 libervolajn kotizojn:

la Helpanto kiu aldone pagas fr. 10.- jare

la Subtenanto kiu aldone pagas fr. 20.- jare.

S-roj Jayet kaj Walder subtenas tiun proponon, ĉar tiele neaktivuloj povas helpi sian parton, dume aktivuloj donas tempon kaj kutime elspezas monon por la propagandiloj, ktp.

La kreo de tiuj 2 membrokategorioj estas akceptata.

7. Budĝeto por 1946.

Ĝi estas sensange akceptata, kia publikigita en SE/3-1946.

8. Elekto de la SES-prezidanto kaj de la konsilantoj.

S-ro Zollinger, kiel vicprezidanto, petas proponojn pri nova prezidanto. Li legas la koncernajn partojn de la statutoj pri la elekto de la prez. kaj konsisto de la C.K.

S-ro Jayet proponas reelekti s-ron Gilliard, kiu treege bone faris sian laboron.

Kun aplaŭdo la kunvenintaro esprimas sian kontentecon kaj s-ro J. Gilliard estas reelektata.

Li dankas por la alfido kaj dankas al siaj kolegoj de la Centra Komitato.

Elekto de la konsilantoj. S-ro Zollinger, kiel ĉefkonsilanto, faras klarigojn pri la du klasoj kaj pri la elektmaniero. Li legas la regularon laŭ kiu vidiĝas, ke nur malgrandparte la postuloj estas plenumitaj. Li esperas plibonigon dum la jaro 1946, ĉar pro la Universala Kongreso multaj eblecoj montriĝos. Li demandas sinsekve la grupestrojn pri siaj proponoj. Escepte Zürich kiu ne priparolis tiun elekton, ĉiuj grupaj konsilantoj restas. Zürich faros pli poste proponon al la C.K. Por la nova grupo en Rheineck, s-ro Liechti estas elektata.

En tiu momento estas laŭtlegata telegramo de s-ro Montandon el La Chaux-de-Fonds kiu bondeziras la jarkunvenon.

9. Elekto de la loko por la estonta jarkunveno.

S-ro Jakob proponas aranĝi la ĝeneralan kunvenon dum la Universala Kongreso por evitigi du vojaĝojn kaj malebligi nur malgrandan partoprenon de la svisa jarkunveno.

S-ro O. Walder proponas du apartajn aranĝojn, el kiuj la SES-kunveno okazu frue en la jaro, plej malfrue dum marto. En kuna aranĝo, la svisaj membroj preferus ĉeesti, je la sola dimanĉo, la aranĝojn de la U.K. kaj pro tio oni devus timi malgrandan ĉefkunvenon.

S-ro Koch subtenas la proponon por du apartaj aranĝoj kaj proponas Luzern kiel kunvenloko por 1947.

Estas decidate aranĝi la SES-tagon aparte, plej malfrue dum marto kaj kunvoki al L u z e r n .

5. Raporto de la Prezidanto de la Ekzamena Komitato.

La prezidanto de la EK komparas, en la enkonduko, la nediplomitojn kun homoj kiuj suferas je dentdoloroj kaj do konsilas al ili kuri al la dentisto.... Estas kuraĝige, ke post jaro sen ekzameno, ni povas anonci 7 kandidatojn; 4 por la Supera Diplomo kaj 3 por la Atesto pri lernado, kiuj ĉiuj sukcesis. Nome:

por la Atesto pri lernado: S-ro Hiltbold, Corseaux s/Vevey
s-ro Liechti, Rheineck
f-ino Stücheli, Fribourg

por la Supera Diplomo: S-ro J.Hohl, Waldhaus-Flims (kun maksimumo)
s-ro J.Koch, Luzern
s-ro E.Kuder, Hausen a.Albis
s-ro W.Nüesch, Balgach

S-ro Gilliard esprimas sian kontentecon, ke kelkaj kandidatoj kuraĝis submeti sin al ekzameno. Li kore gratulas la diplomitojn, diras sian esperon vidi ilin vigle subteni nian movadon kaj instigas aliajn gesamideanojn al preparado por ekzameno. Li memorigas, ke d-ro Jaccard ĉiam estas preta konsili por tia preparado kaj korekti taskojn.

10. Diversaĵoj.

Universala Kongreso en Svislando 1947.

La prezidanto sciigas, ke la kunveno ne povas decidi pri tio, sed nur la CK en konsento kun la estraro de IEL, post fundaj esploroj kaj kondiĉoj de kondiĉoj en la diversaj lokoj.

D-ro Privat deziras scii, ĉu la CK antaŭvidas por tiu aranĝo Bern aŭ Zürich.

S-ro Gilliard klarigas ke ne tiom gravas la loko sed la plej favoraj kondiĉoj financaj subvencioj kaj avantaĝoj por la movado.

S-ro Fauser vigle parolas favore de Zürich, kvankam li ne ankoraŭ priparolis kun la tiea E-grupo; li kredas ke tiu urbo, la plej granda en la lando, plej taŭgas. Li jam parolis kun la urbestro, kiu deklaris sian intereson kaj subtenus konvenan subvencion por la afero. S-ro Müller deklaras, ke la grupo en Zürich ne sentas sin preta por tiu granda afero.

D-ro Privat ne konsideras Zürich kiel oportuna, ĉar de 40 jaroj la kontraŭuloj ek de tiu urbo volas bati nin.

S-ro Jakob timas, ke pro la nunaj cirkonstancoj la nombro de la partoprenontoj ne estos sufiĉa por imponi en tiu granda urbo. Li atentigas pri la malfacilaĵoj devizaj por la eksterlandanoj, kaj li konsilas unue atingi konfirmon de la koncernaj instancoj en Bern, ke la kongresanoj el eksterlando povos ricevi monon.- Por faciligi la partoprenon de la Francoj, li proponas urbon en la "velsa" parto de la lando, sed ne Genevo.

S-ro Cseh deklaras, ke li ŝatas optimismon, ke malhelpoj ne devas haltigi nin, tamen en la koncerna afero la malhelpoj, nedependaj de ni, estas sufiĉe gravaj por ke ni bone priatentu ilin.

S-ro Jakob proponas la elekton de speciala komitato por esplori la demandon devizajn.

D-ro Privat zorge demandas, ĉu jam okazu UK en 1947. Laŭsperte konferencoj kun 100-150 landaj delegitoj ne malpli efikas je gazetaro ktp.

La CK esploru ĉu ne estas pli bone kontentigi sin per konferenco, kiu cetere ne malhelpus vojaĝemajn esperantistojn veni Svislandon por ĉesti la konferencon de la delegitoj.

S-ro Fauser ne partoprenas la tro (laŭ li) pesimistajn antaŭvidojn de la antaŭaj parolintoj, kontraŭe li kredas je pliboniĝo de la internacia situacio post unu jaro kaj konsekvence je la sukceso de UK. La proponita speciala komitato por la esploro de la devizaj malfacilaĵoj estas elektata: S-ino Fischer, s-roj Jakob kaj Fauser kunlaboros kun la CK por tiu afero.

S-ro Walder donas bonajn informojn pri instruado de Esperanto al germanaj militkaptitoj en Anglujo kaj pri la abonantaro por "Heroldo de Esperanto".

S-ro Jakob memorigas pri s-ro Jean Borel, mortinta dum la lasta jaro, kaj pri liaj grandaj meritoj. Li raportas pri la klopodoj por translokigi la familion Zamenhof al Usono.

S-ro Kürsteiner nome de la organizintoj de la manifestacioj en St. Gallen dankas la kunvenintojn kaj disdonigas al ili tre plaĉan memordonacon, produktaĵo de nova industrio en la urbo.

Post danko al la organizintoj kaj ĉiuj partoprenintoj, la prezidanto fermas la ĝeneralan kunvenon je la 12.15 h.

La sekretario:

O. Walder.

La prezidanto:

Js. Gilliard.

Denaska Esperantistaro.

La celo de tiu asocio estas krei novan generacion de laŭ-naturaj Esperantistoj jam de naskiĝo, kiuj eniros la mondon, kiel vivantaj pro-pagandiloj. Ĝi havas jam anojn de 12 landoj.

D.E. celas instigi gepatrojn, kiel eble plej frue post la naskiĝo dediĉi la infanon al nia movado, eduki ĝin tiel, ke ĝi estu dulingvano. Por helpi al la infano kaj al la gepatroj, D.E. nomas lokan Esperantistinon por rilati kun la infano kvazaŭ paptopatrino kaj kuraĝigi ĝin.

Ĝi tiel edukiĝu en la hejmo, ke ĝi fariĝu modeste fiera pri lingvo parolata de noblanimaj kaj kleraj homoj tra la tuta mondo. Enirante la lernejan vivon, la infano semos la ĝermon inter siaj gekunuloj kaj geinstruistoj.

Aperas de tempo al tempo bulteno por informi la gepatrojn kaj amuzi la gefilojn. Por ke neniu estu malhelpata pro la kostoj, la kotizoj estas tre malaltaj. Por infanoj ĝis lernejaĝo, la kotizo estas minimume fr. -.50 poĵare, por pli aĝaj fr. 1.- .

Geonkloj el ĉie en la mondo estas bonvenigataj.

Aliĝojn peradas al la prezidanto, s-ro R. Robertson, Londono, la ĉefdelegito de IEL, O. Walder, Romanshorn.

=====

R a d i o . BERN , ondoj 47,28 m. La serio de disaŭdiĝoj en Esperanto pri la Ruĝa Kruco estas finita. Nova serio de paroladoj de d-ro Privat pri Federalismo kaj Paco nun okazos ĉiuĵaŭde vespere je 19.05 h. sur la samaj ondoj.

2 novaj kategorioj da membroj. Kiel dirate en la protokolo de la ĝenerala kunveno en St.Gallen, estas decidite, por faciligi la laboron de nia societo, krei du novajn kategoriojn de membroj, nome: La Helpantoj kiuj pagas, plie de la normala kotizo frj 10.- jare; la Subtenantoj kiuj pagas frj 20.- jare. Tiamaniere la personoj, kiuj ne povas doni laboron kaj tempon por nia societo kaj tamen deziras helpi, povos tiele kontribui je la bonfarto de nia landa societo. La CK esperas, ke multaj de niaj membroj senprokraste resendos la slipon kiu troviĝas en tiu numero de SE, kaj samtempe pagos la koncernan sumon je la poŝtĉeka konto: VIII 21395 Zürich.

Emajlaj insignoj. Belaj, mezgrandaj insignoj (verda stelo sur blanka-fono) ree estas haveblaj kun pinglo, broŝo aŭ por butontruo. Prezo: fr. 1.60 plus 0,20 por afranko.

Insigno: svisa flago kaj verda standardo, tre taŭga por la Universallaj Kongresoj kaj vojaĝoj eksterlande. Prezo fr. 2.- plus afranko. Mendebila per verda enpagilo ĉe nia kasistino.

Propagando. La franclingva gazeto ESSOR, aperigis numeron tute dediĉitan al Zamenhof kaj Esperanto. Tre taŭga por la propagando kaj por plezurigi viajn franclingvajn korespondantojn. Prezo po ekzemplero: fr. 0.20, uzu large tiun propagandilon valoran.

ONU-slipoj. La personoj, kiuj ankoraŭ havas subskribitajn slipojn bonvolu rapide resendi ilin al ni. Ni profitas por kore danki la gesamideanojn, kiuj diligente kolektis subskribojn kaj resendis ilin al ni. Entute ni ricevis proksimume 1000.

N I H E L P U .

Kiu volas helpi al la Esperanto-Movado en Finnlando, tiu sendu al la redakcio de SE uzitajn, sed ankoraŭ bonajn vestaĵojn kaj tolaĵojn.

Malgraŭ la help-petoj kiuj senĉese atingas nin, ni ne dubas, ke multaj gesamideanoj respondos al tiu alvoko sendante pakaĵojn.

Nur tiuj estas feliĉaj, kiuj havas la spiriton direktitan al iu celo alia ol la propra feliĉo.

Stuart Mill.

Kiel jam dirite (S.E. no. 3, paĝo 26), apenaŭ finiĝis la milito, ke aperas novaj verkaĵoj pliriĉigantaj nian esperantan literaturon. Legante tiajn librojn, kiajn ni recenzas tie ĉi (ĉiuj haveblaj pere de s-ro O. Walder, Eigenheim, Romanshorn), ni certe plialtigos la nivelon de nia kulturo, ĉar ili estas vere valoraj.

Agnes Bogh-Hogsted: "Pli ol fantazio". Dana Esperanto-Eldonejo, Aaby-hoj, 1946, broŝurita, 70-paĝa. Tradukita el la dana lingvo.

Tiu verkaĵo enhavas kvin novelojn. La unua priskribas la vivon kaj morton de malriĉa servistino; la dua estas verdire "pli-ol-fantazia", ĉar ĝi amuze pritraktas la seriozan proplemon de la post-morto; la tria temas pri lernanto-violonisto, kies patro malŝatas la muzikon; en la kvara novelo, oni "fajfas fluton, dum estas kadavro en la domo"; la kvina rakonto estas kortuŝa am-historio, kiu finiĝas tamen kontentige.

Ni nur diru, ke la aŭtorino (tre konata en sia lando) ŝajnas posedi ampleksan scion pri la homoj kaj iliaj sentoj. La maniero, kiel ŝi konstruas siajn novelojn atestas pri ŝia lerteco. Rimarku ekzemple en la unua rakonto la mirindan intermikson de la estonteco kaj pasinteco, kiu tamen restas ĉiam klara. La aŭtorino montras specon de malvarma bonhumoro, ekzemple en jena frazo (taŭga por gramatiko!):

"La profesoro iris al la pordo kaj kraĉis malproksiman en la ĝardenon, post kio li daŭrigis sian pensadon".

Ankaŭ laŭdinda estas la Esperanta traduko de C. Gravensen. Por konvinkiĝi pri lia lerteco, oni laŭtlege lian tradukon de la jenaj malmultaj versoj troveblaj ie ajn, meze en la prozo:

"Infanoj sankvalitaj ni estas, ho amiko,
du blankaj grenograĵoj en unu sama spiko.
Ni vivas flank-ĉe-flanke en sama la aero,
nin kune kreskigas la suno de l' somero.
En saman teron, fine, nin kune oni metos,
kaj kune trans la tombo la vivon ni ripetos."

La tradukinto uzas kelkajn neologismojn, el kiuj duona dekduo ne estas troveblaj en la "Plena Vortaro", sed difinitaj en la fino de la libro. Sed ĉu la difino donita por "pigeono" ("speco de pomoj kun belruĝa koloro") klaras al ĉiu leganto? Ĉu oni rajte diru, ke la muzika termino "Pizzicato" estas neologismo? Mia opinio, ne! Ĉar ĝi estas simple la konata itala vorto sensange enkondukita en la libron (dum "picikato" estus estinta neologismo). Ĉiuj muzikludantoj komprenas ankaŭ senpene la vorton (esperantigitan) "flaĝoleto".

Nur 2 aŭ 3 preseraroj, facile videblaj. Rekomendinda libreto, belaspekta kun sia kovrila desegnaĵo.

P.E. Schwerin: Gaja leganto per Esperanto. Eldonejo: The Esperanto Publishing Company Ltd., Rickmansworth, Anglujo, broŝurita, 56-paĝa.

Entenas spritaĵojn, vortludojn, anekdotojn, matematikaĵojn, rimaĵojn kaj (tie laŭdinde!) almenaŭ 65 spritajn... preserarojn, kiuj certe gajigos vin, ekz. "ĉiu havas sian ŝarkon". Tiun libreton oni uzu en kursoj, en grupaj kunvenoj. Cetere ĝi entenas societludojn kaj valorajn konsilojn por grupestroj kaj kursgvidantoj.

Jac.

La ĝis nun recenzitaj libroj kostas ĉe s-ro Walder (plus 10% de poŝtelspezoj):

"La granda aventuro" de F. Szilágyi:	sv. fr.	7.50
por la membroj de la "Stelo-Klubo	" "	6.--
"La forto de l' vero" de Adi:	" "	2.40
"Pli ol fantazio" de A. Bogh-Hogsted	" "	2.85
"Gaja Leganto per Esperanto" de P.E. Schwerin	" "	1.15

Anoncoficisto klopodas ricevi mendon de komercisto...

-- Tio estas tute superflue, mia firmao estas malnova kaj bone konata.

-- Nu, Sinjoro, la Bona Dio ankaŭ estas malnova kaj multe pli bone konata ol via firmao, kaj tamen estas ankoraŭ necese sonorigi por alvoki la fidelulojn!

La pentristo X., renkontas en la vilaĝo sian amikon, la kuracisto, kiu pro enuo terure oscedas.

-"Je diablo! vi ne ŝajnas tre amuzigi ĉi-tie!"

-Ha! malbenon al via enuiga kamparo! Ĉi-tie oni ne scias kiel mortigi la tempon."

- Nu do ! pretigu recepton por ĝi!

Juna edzo: "Adiaŭ, mia trezoro, se hodiaŭ vespere mi ne povas reveni kiel kutime, mi skribos al vi leteron."

Edzino: "Ne, edzo kara, tio ne estas necesa; mi jam prenis la leteron el la poŝo de via surtuto!"

Oni filizofas pri la ne elĉerpbla temo: la virino.

-" Jes, diris iu sinjoro, la virino superas la viron, ŝi suferas doloron pli heroe ol ni."

-" Kredeble, vi estas kuracisto?"

-" Ho, tute ne! Mi estas botisto."

Ĉiu penso estas Forto,
kiu tuĵ disvastigas.

P A C O
F E L I Ĉ O
S A N O

PENSO

konfidema

grandanima

humila

paciga

ama

timema

egoista

fierega

kolera

malama

M I L I T O
M A L F E L I Ĉ O

M A L S A N O J

ĈIU KREAS SIAN PARADIZON aŭ INFERON.

La direkto donita al
niaj pensoj revenigas
al ni la konsekvencojn.

Svisa Esperanto-Societo

Centra Komitato:

Prezidanto: S-ro Jules Gilliard,
Collège 142, Neuveville, J. B.-

Vicprezidanto: S-ro R. Zollinger,
Rue de la Paix 111, La Chaux -
de - Fonds.

Sekretario: S-ro O. Walder,
Eigenheim, Romanshorn.

Kasistino: F-ino L. Schaerer,
Schorenstrasse 32, Langenthal.

Kunsidanto: S-ro W. Streun, Höhe-
weg 40, Bern-Liebefeld.

ANONCOJ

(Tarifo: Fr. 0.15 por ĉiu linio aŭ ĝia loko.) 2 linioj = 1 poŝta respondekupono.

La libro estu via amiko
la esperanta libro....
via plej bona amiko!

Libro-abono. Eldona Societo Stockholm ebligas favorprezan abonadon de interesaj libroj. Atentu la aldonitan prospekton. Jam aperis

La Fino
La Granda Aventuro
Mi serĉis oron kaj oleon
sed trovis.....

Gaja leganto per Esperanto

La libreto por grupgvidantoj kaj izoluloj Fr. 1.15

Londonanidoj.

Kiel londonaj infanoj vivis dum la milito en la kamparo Fr. 2.10

La Fino

La interesplena libro, la plej legata libro 2-a eldono Fr. 3.40

3 novaj libroj el Danujo

D-ro Dorner Fr. 6.--
Pli ol Fantazio Fr. 2.85
La forto de l'vero Fr. 2.40

Via libroagentejo: O. W a l d e r,
Romanshorn.

DEZIRAS KORESPONDI:

S-ro Francisco Levy, Montevideo 980, Buenos-Aires, Argentino, kaj interŝanĝi div. objektojn.

S-ro Alan Coulthurst, 155 Derbyshire Lane, Stredford, Lancashire, Britujo, 26 jara dez.kor. kun svisa fraŭlino.

S-ro D. Chapman, 101 Sincil Bank, Lincoln, Anglujo, 19-jara, kun samidean(in)o, kiu ŝatas bicikli kaj piediradi.

S-ro Béla Fejér, mār . intezö, Mako, vasutállomàs, Hungarujo. (Fervojojoficisto)

Membroj de "Asocio Esperantista de Katolikoj Argentinaj" deziras korespondi. D-ro J.A. Quina Gonzales, prez. B. Mitre 1524, Buenos Aires, Argentino.

S-ro Georgi D. Sestrimski, str. Slis-tr " 4, Pazardjik, Bulgarujo, dez.kor. kaj interŝanĝi poŝtmarkojn.

Sozialistische Bildungszentrale, Fach 289, Linz 1 Aŭstrujo.

S-ro Ernst Dressler, Gurten. Ober-Oesterreich, dez. kor, kaj interŝanĝi pm.

S-ro P. Huxley, Gottleitragh, Sloper-ton Rd. Dunlaoghaire, Dublin, Irlando. Kor. k interŝanĝi pm.

S-ro Bryan Doyle, Balnagovan, Mobhi Av. Glasnevin, Dublin, Irlando. kor. k interŝanĝas pm.

=====

Aliĝu al UNIVERSALA FILATELIA ESPERANTO-KLUBO U.F.E.K.

La celoj de U.F.E. K.:

- starigi sur serioza bazo filatelson inter Esperantistoj,
- plifaciligi poŝtmark-rilatojn inter E.-filatelistoj de la tuta mondo, certigante la honestan plenumon de poŝtmark-interŝanĝo,
- instrui E.-filatelistojn pri filatelio per regula eldono de faka gazeto nur en Esperanto.
- Eldoni faklibrojn en Esperanto
- krei diversajn servojn (jam funkcias novaj kaj rondsendaĵ-servoj)
- krei asocian insignon k.t.p.

Ne hezitu, skribu tuj al

UNIVERSALA FILATELIA ESPERANTO-KLUBO
5, rue S, de Brazza, Casablanca, Maroko.



Baumann-Grütter Söhne

Langenthal

Ni rekomendas

el nia tol-teksejo:

teksaĵojn por dommastrumado
tablotukojn
tolojn por brodado
tolojn por vestaĵoj


plie el nia teksejo por dekoracio-ŝtofoj:

ŝtofojn por mebloj
kurtenojn
teksaĵojn por surprasi

Volonte ni liveras en ĉiujn landojn kaj plezure servas interesulojn per ĉiuj dezirataj informoj rilate niajn ŝtofojn.

Nur pogranda vendado.

Ni korespondas esperante, germane, france kaj angle.



Hotel Metropol-Monopol - Bern

Zeughausgasse 28

La hotelo, kiu verdiĝis pro la 31-a Universala Kongreso en 1939 — kaj restis verda! eĉ pliverdiĝis! Trankvila restadejo por gesamideanoj el la tuta mondo. Pluraj Esperantaj gazetoj estas haveblaj en nia restoracio. Pro la afableco de la Esperanto-Grupo Bern, ties biblioteko, kiu enhavas pli ol 300 verkojn kaj troviĝas en la hotelo, staras je dispono de legemaj gastoj. Ni provos ĉiel eble agrabligi vian restadon en Bern.

S-ino A. Fischer, estrino.

MONTREUX

centro por ekskursoj

HOTEL HELVETIE et des FAMILLES

120 litoj

nur 3 min. de la lago

Granda te-ĉambro — Ĝardeno sur la tegmento

Aranĝoj por longa restado

REFORM-VENDEJO SCHAZ

Rapperswil (Kt. St. Gallen)

ĉe Herrenberg (4 min. de la stacidomo)

Ni liveras ĉiajn produktojn por la moderna kuirmaniero kaj por sensalaj kaj diabetaj dietoj:

flokojn de diversaj grenoj

«Nuxo»-produktojn

herbojn por diversaj teoj

spicojn

senalkoholajn vinojn, ktp.,

kaj biologie valorajn kosmetikaĵojn.



Ni ĝojos kiam vi vizitos nian vendejon aŭ kiam vi skribos al ni. Volonte kaj senpage ni donas konsilojn.

S-ino E. Schaz-Burkhardt, Rapperswil (St. G.)

M. SCHAEFER S.A., BERN

Fabriko de kompletaj hospitalinstalaĵoj

Pli ol 50-jara faka sperto



Altpremaj aparatoj kaj instalaĵoj por steriligado, universalaj operacio-tabloj, aŭtoklavoj por laboratorioj, aparatoj por desinfektado, ktp.

Kompletajn instalaĵojn por kuracistoj, plie ĉiujn necesajn por la higieno kaj artiklojn por la flegado de malsanuloj

vi trovas en niaj vendejoj:

BASEL

Streitgasse 4
Tel. 4 82 81

BERN

Schwanengasse 10
5 29 26

GENÈVE


rue du Rhône 15
4 25 37

LAUSANNE

place Pépinet 3
2 86 72

ZÜRICH

Pelikanstrasse 3
23 52 24



Ni liveras kompletajn maŝinarojn por la produktado de:

seka glacio

acetileno (dissolvita).

Ni fabrikas kaj liveras:

aŭtogenajn veldilojn kaj tranĉbrul-

gilojn, valvojn por la ŝtalboteloj

premreduktilojn por ĉiuj gasoj kaj

premoj

karbonacido-fajroestingilojn

elektrajn aparatojn por reguligi

aer-temperaturon kaj-sekecon

Ni korespondas germane, france, angle kaj esperante kaj volonte donos informojn al interesuloj en ĉiuj landoj. Ni tre ĝojos se pere de Esperantistoj ni trovos agentojn en aliaj landoj.

CARBA A.G., BERN Svislando